



# Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 116 (3/2021) ♦ 30-a jaro (tria serio) ♦ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de  
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

[www.esperantic.org](http://www.esperantic.org) [esfacademic.org](http://esfacademic.org) [esfconnected.org](http://esfconnected.org) [interlingvistiko.net](http://interlingvistiko.net)  
[@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf) [www.facebook.com/esperantic](https://www.facebook.com/esperantic)

## ENHAVO

### Venontaj eventoj 3

PoSoMo: Prelegoj kaj Seminario pri la Manlibro	3
54-a ILEI-Kongreso en 2021	3
Seminario: Lingvaj praktikoj en transnaciaj kunteksto	4
Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj	4
UEA-kampanjo celas antaŭenigi Esperanton en Eŭropa Unio	4
Interlingvistikaj Studoj en AMU	5

### Raportoj 7

Retoso	7
PLPLE21: Seminario pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado en Mezameriko kaj Karibio	8
Seminario ĉe la Doktoriga Lernejo en la Universitato de Tours	10
Javier Alcalde ĉe EHESS	11
Ji Chen ĉe KAOEM	11
Lingvo kaj migrado: Sperto kaj memoro	11

### Ĝeneralaj novaĵoj 12

Du junaj esploristoj ricevis Stipendiojn Marjorie Boulton	12
Jarraporto de Esperantic Studies Foundation, 2020	13
UN Esperante	13
Esperanto Por UN	13
Esperanto-Numismatika Asocio – kultura heredaĵo	14
Jubileoj kaj memordatoj	14

Nova afiŝo por la Esperanto-Tago 2021	15
Lanĉo de nova reto pri historio kaj tradukado	15

### **Libroj kaj artikoloj 16**

Kafumi... gustumi? Cerbumi...	16
<i>Plurlingvaj medioj en la Granda Milito</i>	16
Pri <i>Adam Smith en Pekino</i> de Giovanni Arrighi	16
Lernolibro grava, sed idiosinkrazia	16
Coolification and Language Vitality: The Case of Esperanto	17
La jidogramatiko de Zamenhof kaj lia <i>Lingvo universala</i>	17
JKI	17
Opinioj el la tuta mondo pri la estontecoj de edukado	17
Oscar Wilde kaj ĉina saĝulo	17
Tradukado en Socio	18
Les langues en débat dans une Europe en projet	18
<i>ESF Connected</i> : Lastatempaj blogaĵoj	18

### **Stipendioj de ESF 19**

# VENONTAJ EVENTOJ

## PoSoMo: Prelegoj kaj Seminario pri la Manlibro

<https://edukado.net/manlibro/seminario>

Fine de decembro 2020 aperis la nova versio de la *Manlibro pri instruado de Esperanto*. La nombro de la paĝoj duobliĝis, aperis novaj temoj, la antaŭaj estas aktualigitaj, la ĉapitroj rearanĝitaj.

Kvankam la aŭtoroj klopodis verki artikolojn, kiujn ordinara interesiĝanto pri instruado povus kompreni, la tuto fariĝis faka kaj profunda verko. Por helpi en ĝia kompreno kaj bona utiligado Katalin Kováts lanĉis retan prelegserion kaj seminarion.

La trejnado konsistos el du gravaj formoj: okazos

- ◆ 10 publikaj prelegoj, sekveblaj en Zoom kaj
- ◆ 10-parta seminario, kie en diskutgrupoj estos traktataj la temoj kun konkretaj ekzemploj, kaj eblas starigi demandojn, provi ekzercojn, kune labori pri taskoj kaj ricevi individuan helpon.

La programo laŭ la nuna plano komenciĝis la 5-an de junio kaj finiĝos la 21-an de aŭgusto. Estos paŭzo la 31-an de julio kaj la 7-an de aŭgusto.

## 54-a ILEI-Kongreso en 2021

<https://www.ilei.info/>

ILEI lanĉas sian duan Virtualan Esperanto-Kongreson (VEKI), de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto 2021. Okaze de tiu evento Benino restos la ĉefa fokuso, ĉefe en la Nacia Vespero. La kongresa temo estas kaj restas: *Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj*.

La temposkemo de tri sesioj en ĉiu tago restos la sama kiel en VEKI 1 en 2020. La komitatkunsidoj okazos dimanĉe la 8-an kaj marde la 10-an de aŭgusto.

Kiel jam tradicie, dutaga altnivela simpozio okazos ĵaŭde la 12-an kaj vendrede la 13-an de aŭgusto. Nuna stato de la subtemoj (prelegblokoj):

- ◆ 1. Komunikado en multlingvaj edukmedioj – problemoj kaj solvoj  
*Ĉefpreleganto:* Charles Ligan, Université d'Abomey-Calavi (UAC), Benino  
*Diskutanto:* A. Giridhar Rao, Azim Premji University, Barato
- ◆ 2. Esperanto en supera edukado – mitoj kaj faktoj  
*Ĉefpreleganto:* Ilona Koutny, Universitato Adam Mickiewicz (AMU), Poznano, Pollando  
*Diskutanto:* Adel Rafii, University of Isfahan (UI), Irano

◆ 3. Utiloj kaj defioj de neĉeesta lernado kaj instruado

*Ĉefpreleganto:* Manuel Pancorbo, Universidad Nacional de Educación a Distancia (UNED), Hispanio

*Diskutanto:* anoncota

◆ 4. Survoje al virtuala Esperanto-universitato – inter revo kaj realo

*Ĉefpreleganto:* Vicente Manzano-Arrondo, Universidad de Sevilla (US), Hispanio

*Diskutanto:* Elisée Byelongo Isheloke, University of Cape Town, Sud-Afriko

Celo estas, ke la simpozio fariĝu energikolekta kaj pluinspira haltejo survoje al Esperanto-universitato, koncentrita al konkretaj plupaŝoj sur tiu vojo pli ol al belsona akademia traktado de la proponitaj temoj.

*Mireille Grosjean*

## Seminario: Lingvaj praktikoj en transnaciaj kuntekstoj

<https://esperparadigma1.sciencescall.org/>

Berlino, 6-a ĝis 8-a de septembro 2021

Tio estos la unua en serio, kiu pritraktos diversajn aspektojn de emancipaj transnaciaj praktikoj ekde la fino de la 19-a jarcento tra la lenso de la Esperanta paradigmo. La eventoj rezultas el kunlaboro inter la Centro Marc Bloch, EHESS (Altlernejo por Sociaj Sciencoj), la Universitato de Bonn kaj la Universitato de St. Andrews.

Dank' al la financa subteno de la Franco-Germana Universitato eblos pagi la aliĝon de magistriĝaj kaj doktoriĝaj studentoj kaj junaj esploristoj el iu ajn universitato. La evento estos ĉeesta sed eblos ankaŭ partopreni per Zoom. La sesioj estos trilingvaj (angle, france, germane) sen traduko.

## Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj

<https://en.unesco.org/news/unesco-holds-consultations-making-decade-action-indigenous-languages-africa>

La Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj komenciĝos la 1-an de januaro 2022 kaj formos la kongresan temon de la Universala Kongreso en Montrealo en 2022.

## UEA-kampanjo celas antaŭenigi Esperanton en Eŭropa Unio

[https://uea.org/vikio/Konferenco\\_pri\\_la\\_estonteco\\_de\\_Eŭropo](https://uea.org/vikio/Konferenco_pri_la_estonteco_de_Eŭropo)

Eŭropa Unio (EU) konferencas ĝis printempo 2022 por decidi pri estonta evoluo de la ŝtataro. Kadre de tiu konferenco la eŭropuniaj civitanoj estas invitataj proponi ideojn.

UEA alvokas siajn membrojn loĝantajn en EU-landoj partopreni tiun civitanan konsulton per apogo de proponoj favore al nia lingvo. La UEA-Komisiono por Eŭropa Agado kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj landaj asocioj kontaktos deputitojn en la Eŭropa Parlamento kaj en membroŝtatoj, atentigante pri la apogo de por-Esperantaj proponoj, kaj argumentos por la realigo de tiuj proponoj. Tial la partoprenado de UEA-membroj en EU gravas: multnombra apogo ebligas al niaj organizoj efike plividebligi kaj antaŭenigi nian lingvon en EU.

## Interlingvistikaj Studoj en AMU

<http://interl.amu.edu.pl>

[interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl)

Poznano (Pollando), 2021–24

Profesiigu pri esperantologio kaj interlingvistiko!

Kompleta studprogramo pri esperantologio kaj interlingvistiko por tiuj, kiuj volas pliperfektigi en tiu tereno kaj akiri kvalifikon, ekzistas nur en la Universitato Adam Mickiewicz (AMU) en Poznano, unu el la plej gravaj polaj universitatoj. Ekde 1998 ĝi ofertas tri-jaran eksteran postdiploman studadon por internacia publiko. La kursaro okazas en la Etnolingvistika Instituto, sub la gvido de Ilona Koutny kaj kun la kontribuo de elstaraj esperantologoj kiel Vera Barandovska-Frank, Tomasz Chmielik, Nicolau Dols, István Ertl, Michael Farris, Sabine Fiedler, Aleksander Korĵenkov, Katalin Kováts, Aleksander Melnikov, Ida Stria kaj Humphrey Tonkin.

La Interlingvistikaj Studoj komplete en Esperanto donas unuflanke la bazojn de ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, kiuj estas necesaj por konvene loki Esperanton inter la naturaj lingvoj, kaj aliflanke prezentas planlingvojn, el kiuj Esperanto elkreskis. La internacia kaj interkultura komunikado, por kiu Esperanto estis kreita kaj kie ĝi bone funkcias, estas en fokuso. La Studoj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto.

En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevas specialan rolon en la instruista trejnado – al kiu eblas aparte aliĝi. En tiu ĉi tereno ekde la studjaro 2007/08 realiĝas kunlaboro kun ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kaj poste kun Edukado.net. Jen unika eblo por Esperanto-instruistoj akiri universitatan atestilon.

La semestroj komenciĝos per 5-tagaj intensaj sesioj kun kvar studobjektoj (al ili aldoniĝos poste la ekzamenoj). Dum la semestro okazos ankoraŭ po du virtualaj semajnfinaĵaj sesioj. Laŭ la planoj nur la septembraj sesioj estos surloke; la unua sesio en septembro 2021 dependos de la virusa situacio. La dua semestro komenciĝos en februaro. La gestudentoj laboros pri siaj taskoj hejme kaj konsultiĝos rete kun la prelegantoj (kontrolado de ekzercoj, eseoj kaj pliaj kurso-taskoj), parte per reta platformo. Post pretigo de finlaboraĵo kaj fina ekzameno ili

ricevos atestilon pri postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj kiu validas 120 ECTS (eŭropajn studunuojn, same kiel la magistras studoj).

Partoprenontoj el la tuta mondo povas aliĝi ĝis la 1-a de aŭgusto 2021 por la studoj. La unua sesio okazos inter la 21-a kaj la 25-a de septembro 2021, la sekvaj semajnfinaĵ sesioj fine de oktobro kaj komence de decembro.

Postuloj: diplomo pri supergradaj studoj kaj bona scio de Esperanto (min. B2). Partoprenontoj devas plenumi orientigan teston komence de la unua sesio.

Kotizo por unu semestro: 1800 PLN (zlotoj; ĉ. 400 eŭroj); en motivita kazo eblas peti redukton. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj dank' al Esperantic Studies Foundation.

Pluaj informoj kaj aliĝilo haveblas de la adresoj sub la titolo.

Aperis ankaŭ la unua lernolibro de la Studoj: *Interlingvistiko* de Vera Barandovska-Frank, elŝutebla el la retejo de Interlingvistikaj Studoj.

*Ilona Koutny*

# RAPORTOJ

## Retoso

Retoso okazis de la 2-a ĝis la 5-a de aprilo, kaj ĉeestis 200 homoj el 45 landoj. Ni havis tri ĉefajn celojn por la evento, kiam ni decidis organizi ĝin en la pasinta septembro, kaj mi skizos tiujn kaj priskribos, kio okazis, kaj ĉu mia opinio ni realigis ilin, kaj poste mi parolos rekte pri la subteno de ESF kaj ties influo al la evento.

La unua celo estis nur sukcese organizi la eventon. Tio estis neniel certa komence. Retoso estis tute nova evento, kaj kvankam la virtuala IJK bone fartis, ĝi havis rekoneblan nomon, kiu mankis al ni, kaj ĝi okazis, kiam virtualaj eventoj en la Esperanto-komunumo estis novecaj. Kaj ni trafis kelke da problemoj laŭvoje – ekzemple la procedo negoci kaj konfirmi kontrakton kun E@I por la *retevent*-platformo estis tre temporaba kaj prokrastis nian ceteran progreson je monato. Fine tamen ni povas senhezite taksi la aferon sukceso. La evento pli-malpli precize kontentigis niajn atendojn. Ni deziris 200 partoprenantojn, kaj jen precize tiom, kiom ni havis. La teama kunlaboro iris glate kaj restis konstanta de septembro ĉiam ĝis aprilo, kiam la evento fine okazis. Kaj nenio grave devojiĝis en la antaŭtempo aŭ dum la evento mem. Mi faris multe da Esperantaj projektoj en la pasintaj kelkaj jaroj, kaj mi opinias tiun ĉi la plej sukcesa, kiun mi partoprenis.

Nia dua celo estis oferti ion signife malsama ol la virtualaj eventoj, kiuj antaŭis nin. Retoso venas de la vortoj *reto* kaj *etoso*, kaj tio montris, kion ni volis atingi per la evento – ni ne deziris nur pasivan partoprenon sed volis ebligi, ke homoj vere interagu unu kun aliaj dum la okazo de la evento. Tiurilate ŝajnas al mi, ke ni ĝenerale sukcesis. Ni havis pli ol 70 horojn da programeroj kaj respondis al vasta gamo da intereso. Se doni ekzemplojn, miaj propraj plej ŝatataj eroj estis la debato “Ĉu ni uzu la anglan aŭ ni ataku ĝin?”, la prelego “Esperanto: ĉu minoritata lingvo?”, la nokta babilejo “Amerika Gufujo”, la (plene Esperanta) koncerto de Tim Gallego, la ekumena paska diservo, kaj la talentoprezento “Kultura Horo”. Krome, la evento IRIS (Internacia Reta Interfaka Simpozio) okazis paralele al nia programo, kun 7 altkvalitaj akademiaj podiaj diskutoj pri tre diversaj temoj.

Unu kampo nur parte sukcesa tamen estis ebligi renkontiĝojn de homoj el diversaj mondo-partoj. Pro la centrecado de sia horzono kaj la nombro da esperantistoj tie, Eŭropo ĉiam ĝuos plenan sperton, kiam temas pri retaj eventoj. Unu afero, kiu vere feliĉigis min, estis, ke ankaŭ la homoj en la Amerikoj (dum Retoso, ĉirkaŭ duone brazilanoj kaj duone usonanoj) povis tion sperti – ni atingis tiom da homoj, ke ni povis lanĉi ludsesion je la 23-a horo en Rio kaj havi sufiĉe da ĉeestantoj. Tamen ni tute malsukcesis varbi sufiĉe da azianoj al la evento kaj havi sufiĉe da programeroj taŭgaj al ties horzonoj (t.e. nenion por ili ĝis la 16-a horo ĉe ili). Tio eble estis surpriza, ĉar malgraŭ la aneco de 2 homoj el Azio en nia 7-homa organiza teamo, ni fakte

malpli bone sukcesis ol la IJK de 2020 laŭ azia ĉeesto – do mi kredas, ke estontaj reteventoj por la Esperanta junularo faru specifajn planojn por venki tion.

Nia tria celo estis ekigi sinsekvon, por ke Retoso ne estu unufoja evento sed la komenco de nova tradicio de virtualaj eventoj organizotaj de TEJO, kiel daŭra suplemento al ties ĉeestaj ofertoj. Estas tro frue por juĝi, ĉu ni sukcesis pri tio.

Rilate al financoj, ni ne monperdis, kaj modeste profitis je 290 eŭroj. Tion dirinte, ĉar ni ricevis 1000-eŭran subvencion de ESF, estontece ni devus zorge konvinki la TEJO-teamon, ke ni povus organizi la eventon senbezone de ekstera financa subteno. Tio certe eblas, ĉar retrospektive ni povintus multe pli fari por peti mondonacojn kaj povintus malpliigi la kostojn de la programo, sed tio estas io, kion ni devus pripensi.

Origine ni intencis okazigi Retoson dufoje jare, jen paske kaj jen ĉirkaŭ la fino de oktobro, sed tiun planon detruis la nuligo de la ĉeesta IJK de 2021 en Ukrainujo kaj ties virtualiĝo. Do plej frue okazos la posta Retoso venontapaske. Tamen oni notu, ke, dum nia organiza teamo devis fari tiajn aferojn kiel negoci kontraktojn, krei la retejon, inventi nomon por la evento, elpensi la eventon mem, establi ĉiujn internajn laborprocedojn ktp, estontaj organizaj teamoj ne devos ripeti tiun laboron, sed povos simple alpreni la fruktojn de nia laboro. Tiusence mi esperas, ke la baza kosto de estonta organizado estos sufiĉe malalta, ke oni volos entrepreni la taskon.

Fine pri la subvencio ricevita de ESF kaj ĝia efiko. Ni ricevis 1000 eŭrojn, kaj laŭ mi tio estis esenca por la sukcesa realigo de la evento. Per la financa subteno, tio vere senpezigis niajn ŝultrojn. Dum ni povus pasigi plejmulte de nia tempo klopodante ne perdi monon, peti donacojn, strebi redukti kostojn ktp, ni anstataŭe povis fokusigi nian energion por organizi efektive bonan eventon. Krome tiu financa sekureco permesis al ni fari riskajn decidojn, kiujn ni alie ne farus. Ekzemple ni decidis doni senpagan aliĝon al ĉiuj TEJO-anoj, esperante, ke la aliĝkostoj de ne-TEJO-anoj kovros la kostojn. Tio estis sendube la ĝusta decido, ĉar ĝi alportis sufiĉan kvanton da ĉeestantoj por ebligi abundan programon kaj ĝuindan eventon, kaj tio estis decido, kiun ni eble ne farus, se ESF ne donus al ni tiun subvencion.

*Tyron Surmon*

## PLPLE21: Seminario pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado en Mezameriko kaj Karibio

<https://inil.ucr.ac.cr/plple21-esperanto/>

De la 6-a de majo ĝis la 24-a de junio sukcese okazis la Seminario pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado en Mezameriko kaj Karibio: Realizaĵoj kaj Bezonoj organizita de la Instituto pri Lingvistikaj Esploroj de la Universitato de Kostariko (INIL) kunlabore kun Esperantic Studies Foundation (ESF). La bunta kaj tre interesa temaro disvolviĝis sub la sperta gvido de tre internacia grupo de profesoroj kaj esploristoj.



La seminario estas unu el pluraj oficialaj akademiaj eventoj kadre de la Jubileo pro la Ducentjariĝo de la Sendependeco de Kostariko (1821–2021). Plejparte la prelegoj estas haveblaj pere de la jutuba kanalo de INIL kaj pere de Kérwá, bitarkivo de la Universitato de Kostariko. Entute, 99 homoj el 29 landoj aliĝis al la seminario, el kiuj 11 petis oficialan atestilon pri partopreno, kiu estis oportune liverita de la aŭtoritatoj de la Universitato de Kostariko.

INIL dankas la subtenon de ESF, kiu ludis gravan rolon en la sukceso de tiu ĉi akademia evento.

La suba listo indikas la nomon kaj universitaton de la prelegintoj, kaj la titolon kaj adresojn de la videaĵoj.

- ◆ D-ro Jannis Harjus (Universität Innsbruck)  
*Política lingüística en el español peninsular: el caso del andaluz*  
[Lingvopolitiko en la eŭropa hispana lingvo: la kazo de la andaluza]
- ◆ D-ro Michele Gazzola (Ulster University)  
*The value of languages in the labour market*  
[La valoro de lingvoj en la labormerkato]
- ◆ M.L. René Zúñiga Argüello (Purdue University)  
*Las distintas realidades de los criollos de Nicaragua y Costa Rica*  
[Malsamaj realaĵoj de la kreolaj lingvoj en Nikaragvo kaj Kostariko]  
<https://youtu.be/-6-R4i0Wx-I> • Kérwá: <http://hdl.handle.net/10669/83701>
- ◆ D-ino Carla Amorós Negre (Universidad de Salamanca)  
*Políticas lingüísticas en torno al multilingüismo en la Unión Europea*  
[Lingvaj Politikoj ĉirkaŭ multlingveco en la Eŭropa Unio]  
<https://youtu.be/GHf05zDzgng> • Kérwá: <http://hdl.handle.net/10669/83700>
- ◆ D-ro Joseph Farquharson (University of the West Indies, Mona)  
*Corpus Planning for the English-related Creoles of the Caribbean: Progress and Prospects*  
[Korpusa planado por kreolaj lingvoj rilataj al la angla lingvo en la Karibio: Progreso kaj ebloj]  
<https://youtu.be/BrVMeGH7Zh4> • Kérwá: <http://hdl.handle.net/10669/83764>
- ◆ D-ro Federico Gobbo (University of Amsterdam)  
*Esperanto in the web after Covid: current challenges and opportunities for a linguistic community of practice*  
[Esperanto en la postkovima interreto: nunaj defioj kaj oportunoj por lingvokomunumo de uzo kaj praktiko]  
<https://youtu.be/joAONthacMk> • Kérwá: <http://hdl.handle.net/10669/83766>
- ◆ D-ro Carlos Sánchez Avendaño (Universidad de Costa Rica)  
*La conceptualización de la revitalización lingüística*

[La konceptado de la lingva revivigo]

<https://youtu.be/LF49nFDJ4pc> • Kérwá: <http://hdl.handle.net/10669/83657>

- ◆ D-ro Grant Goodall (University of California San Diego)

*La planificación y el aprendizaje: los extraños destinos del Volapük, Esperanto e Interlingua*

[Lingvoplanado kaj lernado: la strangaj destinoj de Volapuko, Esperanto kaj Interlingua]

<https://youtu.be/-7FYiAAqwRk> • Kérwá: <http://hdl.handle.net/10669/83780>

- ◆ D-ro Víctor Manuel Sánchez Corrales (Universidad de Costa Rica / Academia Costarricense de la Lengua)

*Códigos de la lengua española y política lingüística panhispánica ASALE*

[Kodoj de la hispana lingvo kaj tuthispana lingvopolitiko ASALE]

<https://youtu.be/vAC5ad1iSVo> • Kérwá: <http://hdl.handle.net/10669/83798>

*D-ro Jorge Antonio Leoni de León*

Instituto pri Lingvistikaj Esploroj (INIL)

Universitato de Kostariko

## Seminario ĉe la Doktoriga Lernejo en la Universitato de Tours

14-a de aprilo ĝis 2-a de junio 2021

<https://collegedoctoral-cvl.fr/as/ed/CDCVL/formations.pl?mat=285954>

Ĝus okazinta seminario pritraktis la temon de interlingvistiko kaj esperantologio.

La seminario nomiĝis *Langues artificielles et constructions langagières: un observatoire des relations entre le naturel et le culturel* (“Artefaritaj lingvoj kaj lingvaj konstruaĵoj: observejo de la rilatoj inter la konceptoj de natureco kaj kulturo”). Ĉeforganizanto estis Philippe Planchon de la Departemento de Lingvosciencoj de la Fakultato de Literaturoj kaj Lingvoj, de la Universitato de Tours.

Prelegis:

- ◆ Pascal Dubourg-Glatigny (CNRS)
- ◆ Federico Gobbo (Universitato de Amsterdamo)
- ◆ Sabine Fiedler (Universitato de Leipzig)
- ◆ Ilona Koutny (Universitato de Poznano)

Povis aliĝi doktoriĝantaj gestudentoj el diversaj fakoj (lingvistiko, soci-lingvistiko, literaturo, kulturaj studoj, homaj sciencoj) de la Universitato de Tours kaj de la Universitato de Orléans. Neniu antaŭa kono pri la temo estis necesa por ĉeesti la seminarion.

La studlingvoj estis la franca kaj la angla.

## Javier Alcalde ĉe EHESS

<http://koyre.ehess.fr/index.php?3246>

Dum la tuta junia monato Prof. Javier Alcalde (Aŭtonoma Universitato de Barcelono) estis gastprofesoro ĉe EHESS (Altlernejo por Sociaj Sciencoj) en Parizo. La restadon akompanis serio de prelegoj, kiuj okazis en diversaj momentoj pro la pandemio.

Jam la 5-an de februaro 2020, Prof. Alcalde prelegis pri “Elmigrado de respublikanaj esperantistoj el Hispanio” okaze de la seminario pri Lingvoj kaj Migrado de Prof. Claire Zalc.

Aprile 2021 la prelegoj okazis per Zoom. La 12-an, li prezentis la prelegon “Pioniroj de Esperanto” kadre de la seminario pri *La granda milito* de Prof. Stéphane Audouin-Rouzeau; la 10-an de majo pri “Esperanto dum elmilitiĝo en orienta Eŭropo” okaze de la seminario pri *Rusaj kaj centreŭropaj mondoj* de Prof. Catherine Gousseff; kaj la lasta prelego okazis la 26-an de majo kaj rilatis al “Esperanto, la latino de la laboristoj” dum la seminario pri *Historio de socialismoj* de Prof. Christophe Prochasson, prezidento de EHESS.

## Ji Chen ĉe KAOEM

Dum la maja kunveno de KAOEM (Komisiono de UEA pri Azia-Oceania Esperanto-Movado) Ji Chen prezentis pri Esperanto-edukado en Ĉinio. Pli ol dek universitatoj okazigas kursojn pri Esperanto, kaj viglas retaj kursoj. Ĉina Esperanto-Ligo baldaŭ preparos serion da filmetoj por instrui Esperanton.

## Lingvo kaj migrado: Sperto kaj memoro

<https://mediacentral.princeton.edu/channel/Language%2Band%2BMigration%253A%2BExperience%2Band%2BMemory/207801383>

Videaĵoj de ĉiuj sesioj en la aprila/maja simpozio ĉe la Universitato Princeton estas nun disponeblaj. Necesas registri ĉe la retejo.

# ĜENERALAJ NOVAĴOJ

## Du junaj esploristoj ricevis Stipendiojn Marjorie Boulton

Guilherme Fians kaj Edwin Michielsen ricevis la Stipendiojn Marjorie Boulton de la jaro 2021, laŭ lastatempa anonco de Esperantic Studies Foundation.

### Guilherme Fians (Brazilo)

Fians doktoriĝis pri socia antropologio en la Universitato de Manĉestro (Britujo) en 2019, kaj estas nuntempe Lekciisto pri Antropologio en la Universitato de Brazilio. Li estas kunredaktoro de la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies* kaj estrarano de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

Liaj nunaj esploroj estas bazitaj je la temo de lia doktora disertacio: etnografia studo pri la Esperanto-movado en Francio. La esploroj celas kompreni kiel lingvoj kaj ciferecaj komunikiloj havas efikon je la maniero, laŭ kiu homoj evoluigas kaj plukomunikas politikajn perspektivojn.

“Mia projekto esploras, kiel dekstremaj naciistoj mobilizas kradvortojn, ret-robotojn, lingvojn kaj aliajn diskursajn mekanismojn por igi retajn politikajn diskutojn pli dinamikaj kaj, samtempe, pli konfrontaj,” klarigis d-ro Fians. “Mi esploros tiujn temojn el originala perspektivo kiu klarigos la manifestiĝojn de tiuj fenomenoj trans landlimojn, kun fokuso je brazilaj Esperanto-parolantoj.”

### Edwin Michielsen (Nederlando kaj Kanado)

Michielsen posedas bakalaŭran kaj magistran diplomojn pri japanaj studoj de la Universitato de Leiden, kaj lastatempe (2021) doktoriĝis ĉe la Universitato de Toronto per disertacio pri “Proletaj artoj kaj internaciismo en Orienta Azio”. Li rolis kiel gastesploristo en la Universitato Ŭaseda kaj kiel Juna Gasta Esploristo en Seula Nacia Universitato, kaj faris pliajn esplorojn en Ĉinujo (Universitato Tsinghua) kaj Japanujo (Tokia Universitato).

Lia Stipendio Marjorie Boulton ebligas plian viziton al Ŭaseda-Universitato kaj al la Japana Esperanto-Instituto por esplori pri la frua historio de Esperanto en Japanujo kaj Ĉinujo, kaj precipe pri la maniero, laŭ kiu Esperanto estis utiligata de proletaj verkistoj en la unua duono de la dudeka jarcento por konstrui tutmondan lingvan solidarecon kontraŭ imperiaj lingvoj kaj lingva subpremo.

### Stipendioj Boulton

La stipendioj estas tiel titolitaj memore al Marjorie Boulton (1924–2017), eminenta poeto kaj esploristo pri Esperanto tra multaj jaroj, kaj bone konata ankaŭ kiel edukisto kaj esploristo

pri anglaj lingvo kaj literaturo. Aŭtoro de serio de ok enkondukaj libroj pri literaturo ekde *The Anatomy of Poetry* (1953), d-ino Boulton verkis ankaŭ la norman biografion de la fondinto de Esperanto, L. L. Zamenhof, en du eldonoj – angla kaj Esperanta. En Esperanto ŝi verkis originalajn poemojn, eseojn kaj teatraĵojn. Ŝi havis doktoran diplomon de la Oksforda Universitato kaj estis membro de la Akademio de Esperanto.

“Ni ĝojas povi helpi tiujn du junajn fakulojn en ilia ekzamenado de la maniero, laŭ kiu la movado por la Internacia Lingvo Esperanto interrilatiĝas kun pli vastaj politikaj kaj lingvaj fortoj,” komentis Charles O. Mays, ĉefdirektoro de Esperantic Studies Foundation. “Ni sentas nin honorataj, ke ni povas bonvenigi ilin en la esploran komunumon de ESF.”

## Jarraporto de Esperantic Studies Foundation, 2020

<https://www.esperantic.org/eo/pri-ni/raportoj/>  
<https://www.esperantic.org/en/about-us/reports/>

La raporto estas nun elŝutebla el la reto.

## UN Esperante

<https://unesperante.wordpress.com/author/unesperante/>

Ekde aprilo tiu ĉi blogo, nur en Esperanto, aperigis la jenajn originalajn artikolojn:

- ◆ Oftaj demandoj pri homaj rajtoj kaj klimatsanĝiĝo
- ◆ Unuiĝintaj Nacioj kaj Vikipedio por la rajto al sana medio
- ◆ Senŝtataneco kaj homaj rajtoj
- ◆ Malegaleco venkas denove
- ◆ Monda Tago de Rifuĝintoj 2021

## Esperanto Por UN

<http://esperantoporun.org/eo/hejmo/>  
<http://esperantoporun.org/en/home/>

La retejo *Esperanto Por UN* pritraktas aktualaĵojn kaj eventojn pri Esperanto, UN kaj Unesko. La retejo aperigis mesaĝojn pri internaciaj observo-tagoj, inter aliaj la [Internacia Tago de Familioj](#), la [Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo](#) kaj la [Monda Tago de Rifuĝintoj](#).

Aperis ankaŭ la Esperanta traduko de la [Rezolucio de UN pri la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido](#).

Entute, la retejo aperigis, ekde aprilo, la jenajn informojn:

- ◆ “Niaj novaj agoj por disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto”, prelego de Trezoro Huang Yinbao en la 53-a Malferma Tago de UEA/TEJO, 2021
- ◆ Novan numeron de Unesko-Kuriero, januaro-marto 2021
- ◆ Tago de la angla lingvo 2021
- ◆ Kunlaboro inter la Oficejo de UN en Ĝenevo (UNOG) kaj la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Kunlabora Rilato kun UN (CoNGO)
- ◆ Lingvaj rajtoj kaj junuloj: defioj kaj oportunoj (partopreno de TEJO en Ekosoc)
- ◆ Informilo 51 – 2021
- ◆ Internacia Tago de Familioj 2021
- ◆ Paco kaj Konfido UN Rezolucio
- ◆ Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo
- ◆ Tago de la Rusa Lingvo 2021
- ◆ Tago de Rifuĝintoj 2021

## Esperanto-Numismatika Asocio – kultura heredaĵo

[bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be)

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita Esperanto-Numismatika Asocio (ENA), probable la ununura tiufaka grupo en la historio de Esperanto, kun revuo *Esperanta Numismatiko*.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

*Bert Boon*

iniciatoro de ENA

ĉefredaktoro de *Esperanta Numismatiko*

## Jubileoj kaj memordatoj

<https://sezonoj.ru/2021/06/junio-8/>

Aleksander Korĵenkov ĉiumonate pretigas kaj publikigas liston de plej gravaj Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por la kuranta monato. La junia listo estas konsultebla en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*.

## Nova afiŝo por la Esperanto-Tago 2021

<https://i.getspace.eu/cloud/index.php/s/MPETo3GExBZNgyF?path=%2FEO-TAGO-2021-afishoj>



Afiŝo estis pretigita por la Esperanto-Tago, 26-a de julio 2021. UEA nun aktive arigas tradukojn por nacilingvaj versioj de la afiŝo, tiel ke landaj kaj lokaj asocioj ricevu de UEA uzeblan afiŝon, por eluzo en retejoj aŭ per fizika elprintado. Almenaŭ deko da lingvaj tradukoj jam alvenis.

## Lanĉo de nova reto pri historio kaj tradukado

<http://historyandtranslation.net/join>

<http://historyandtranslation.net/htn2022> (konferenco)

La Historia kaj Traduka Reto (*History and Translation Network*) estas respondo al la kreskanta graveco de la historio de tradukado kaj interpretado, kaj sur la kampo de tradukaj kaj interpretaj studoj mem kaj en historiaj studoj. En la pasintaj 10–15 jaroj okazis notinda pliinteresiĝo pri historiaj esploroj pri tradukado kaj interpretado kaj la teoriaj kaj metodologiaj problemoj, kiujn ili levas. Tio videblas ankaŭ en la kreskanta uzo, fare de aliaj fakoj, de tradukado kiel metaforo aŭ paradigmo.

Ni celas partoprenigi esploristojn kaj praktikistojn el ĉiuj mondopartoj, el ĉiuj intelektaj kaj kulturaj tradicioj, kaj el vastampleksaj fonoj fakaj kaj instituciaj kiel: tradukaj kaj interpretaj studoj, historio, literaturaj studoj, kulturaj studoj, sociologio, komparaj studoj, filologio kaj lingvoj, antropologio, religio, internaciaj rilatoj, filozofio, arkivaj studoj, muzeaj studoj, kaj iu ajn alia kampo, al kiu konvenas perspektivo transnacia aŭ kompara.

Aliĝu esploristoj kaj studentoj el ajna fono institucia, geografia kaj faka, kiuj havas historian intereson pri tradukado kaj/aŭ interpretado. Membriĝo estas senpaga. Senfiliaj aŭ sendependaj esploristoj estas bonvenaj. Por aligi, bonvolu registriĝi ĉe la ĉi-supra adreso.

# LIBROJ KAJ ARTIKOLOJ

## Kafumi... gustumi? Cerbumi...

<https://uea.org/teko/libroj>

Ĝus elektronike bakita frandaĵo por exploremaj esperantologoj pri la uzado de la sufikso *-um-* aperis en la subparto *Teko* → *Elŝuteblaj libroj* de la retejo de UEA. La kolekton kompiladis dum pli ol 50 jaroj Anatolo Gonĉarov (Rusujo), honora membro de TEJO.

## *Plurlingvaj medioj en la Granda Milito*

<https://www.bloomsbury.com/uk/9781350141346/>

Tiu anglalingva libro (*Multilingual Environments in the Great War*) esploras la diversajn manierojn, laŭ kiuj oni uzis lingvon por provi kompreni la Unuan Mondomiliton. Proponante pliajn evoluigojn en novema aliro al la studo de tiu konflikto, ĝi disvolvas transnacion vidpunkton pri la militsperto por malkovri malpli atenditajn kampojn de lingvouzo en la milito.

Portante la studon de la Unua Mondomilito longe trans la Okcidentan Fronton, ĉapitroj ekzamenas spertojn en multaj regionoj, inkluzive Afrikon, Armenujon, postmilitan Aŭstralion, Rusujon kaj Estonujon, kaj en diversaj situacioj, de militprizonoj kaj koncentrejoj ĝis atendo-vicoj por manĝi kaj postmilitaj barakoj. Ĉerpante el vaste diversaj lingvoj kiel Esperanto, la flandra, la itala, la svahila, la portugala, la rumana kaj la turka, *Plurlingvaj medioj en la Granda Milito* kunigas lingvajn militspertojn de kaj batalantoj kaj la hejmfronto, ligante lingvon kaj literaturon al lingva analizo pri la tujeco de komunikado.

## *Pri Adam Smith en Pekino* de Giovanni Arrighi

Alessandra Madella

<http://esperanto.cri.cn/recomended2/3842/20210611/675025.html>

Giovanni Arrighi (1937–2009) estis itala profesoro pri politika ekonomiko, kiu longe instruis en Afriko kaj ĉe Universitato Johns Hopkins en Usono.

## Lernolibro grava, sed idiosinkrazia

<https://esfconnected.org/2021/05/28/lernolibro-grava-sed-idiosinkrazia/>

Recenzo de Hans Becklin pri *Amikaro: Lernolibro de Esperanto* de Federico Gobbo.



## Coolification and Language Vitality: The Case of Esperanto

Federico Gobbo

<https://www.preprints.org/manuscript/202104.0505/>

Dum Esperanto ĝuas pozitivan reviviĝon en la cifereca epoko, taksoj pri ĝia viveco estas ofte problemaj kaj eraregemaj, kaj tial oni bezonas teorion konsideron.

## La jidogramatiko de Zamenhof kaj lia *Lingvo universala*

Christer Kiselman

<http://uu.diva-portal.org/smash/record.jsf?pid=diva2%3A1520203>

Zamenhof verkis jidogramatikon dum kelkaj jaroj ĉirkaŭ 1880, en la rusa, verŝajne almenaŭ parte en Moskvo. Proksimume samtempe li laboris pri planlingvo nomita *Lingvo universala*, kiu estas pluevoluigita versio de lia unua konata lingvoprojekto *Lingve uniwersala* (1878) kaj antaŭiranto de *Lingvo internacia* (1887), poste konata kiel Esperanto.

Ĉi tie mi prezentas la jidogramatikon de Zamenhof kaj komparas ĝin kun *Lingvo universala*. La komparo (en Esperanto) montras, ke jido influis *Lingvon universalan* pli ol ĝi influis Esperanton.

Baldaŭ aperos la anglalingva versio ĉe la Universitato de Upsalo, en la serio *Uppsala Jewish Studies*.

## *JKI*

Al interesiĝantoj pri priesperanta literaturo mi konsilas la lingvistikan revuon de la Universitato de Adam Mickiewicz, *JKI* (*Język, Komunikacja, Informacja* “Lingvo, Komunikado, Informado”). Speciale *JKI* 2015 koncentriĝis pri esperantologio kaj interlingvistiko.

*Ilona Koutny*

## Opinioj el la tuta mondo pri la estontecoj de edukado

Francis Hult

<https://en.unesco.org/futuresofeducation/submission/francis-m-hult-united-states>

## Oscar Wilde kaj ĉina saĝulo

Alessandra Madella

<https://esperanto.cri.cn/recomended2/3842/20210602/668063.html>

## Tradukado en Socio

<https://benjamins.com/catalog/tris>

Tiu esence interfaka revuo (angle: *Translation in Society*) celas esplori tradukadon kiel kernan socian rilaton en profunde interligita mondo.

## *Les langues en débat dans une Europe en projet*

Zorana Sokolovska

Liono, ENS éditions, 2021

<https://www.amazon.com/dp/B08P3L33W2>

<https://books-openedition-org.inshs.bib.cnrs.fr/enseditions/17910>

Ĉi tiu libro enfokusigas la aperon kaj cirkuladon de prilingvaj ideoj en la Konsilio de Eŭropo, inkluzive de la naturo de plurlingvismo, ĝia rolo kaj problemoj por la administrado de Eŭropo.

## *ESF Connected: Lastatempaj blogaĵoj*

<https://esfconnected.org/past-posts/>

- ◆ “Multlingvaj kaj multkulturaj homoj kaj ilia identeco” / “Personnes polyglottes et multiculturelles et leur identité” / “Multilingual and multicultural people and their identity”  
• Natalia Dankova (26-a de aprilo 2021) • <https://esfconnected.org/2021/04/26/>
- ◆ “ESF: The Marjorie Boulton Fellowships” • Humphrey Tonkin (29-a de aprilo 2021) • <https://esfconnected.org/2021/04/29/>
- ◆ “Clarence Bicknell – Esperanto kun vervo” / “Clarence Bicknell – Esperanto with gusto”  
• Marcus Bicknell (7-a de majo 2021) • <https://esfconnected.org/2021/05/07/>
- ◆ “NASK: Nord-Amerika Somera Kursaro” / “NASK: North American Summer Courses”  
• Ellen Eddy (17-a de majo 2021) • <https://esfconnected.org/2021/05/17/>
- ◆ “Lernolibro grava, sed idiosinkrazia” • Hans Becklin (28-a de majo 2021) • <https://esfconnected.org/2021/05/28/>
- ◆ “Retoso” / “Retoso – the new Esperanto youth event!” • Tyron Surmon (7-a de junio 2021) • <https://esfconnected.org/2021/06/07/>
- ◆ *Bibliotekoj 4*: “Enkonduko al la alfabeto katalogo de la biblioteko de GDREA” / *Bibliothek 4*: “Alphabetischer Katalog der Bibliothek des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR” / *Libraries 4*: “An introduction to the GDREA alphabetical catalogue”  
• Detlev kaj Wera Blanke (18-a de junio 2021) • <https://esfconnected.org/2021/06/18/>
- ◆ *Planlingvaj ekskursoj 3*: “Kaŝaĵo klare videbla” / *Conlang Excursions 3*: “Hidden in Plain Sight” • Simon Davies (28-a de junio 2021) • <https://esfconnected.org/2021/06/28/>

# STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

## Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

## Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al [admin@esperantic.org](mailto:admin@esperantic.org), por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

## Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31-a de januaro
- ◆ 30-a de aprilo
- ◆ 30-a de septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

*IpI* estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies kaj Angela Tellier.

Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al Angela Tellier ĉe [ipi@esperantic.org](mailto:ipi@esperantic.org). Limdato por la venonta numero: 30-a de septembro 2021. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj. ESF en la reto: [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org), [esfacademic.org](http://esfacademic.org), [esfconnected.org](http://esfconnected.org), [interlingvistiko.net](http://interlingvistiko.net), [www.facebook.com/esperantic](https://www.facebook.com/esperantic). Tvitero: [@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf), [@esfacademic](https://twitter.com/esfacademic).

#### **Estraro de CED**

Mark Fettes (direktoro), Guilherme Fians (esperantologio, interlingvistiko), Michele Gazzola (lingvopolitiko), Angela Tellier (universitataj studprogramoj), Orlando Raola (bibliotekoj). <https://uea.org/asocio/CED>